# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de Ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**



**PLENUMITA 13/06/2024 sescentnaŭdekunua eldono (unua eldono 26/09/2011)**

**Subtenu vian Novaĵleteron**

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**
Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo
Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

## Aŭstra esperantisto nun vizitas Aŭstralion

Pasintan ĵaŭdon frue matene alvenis al Tullamarine , la melburna flughaveno, Ewald Schick, aktiva esperantisto de la aŭstra urbo Graz .

Kelkaj aŭstraliaj esperantistoj jam “konas” lin ĉar li prelegis per zoom kadre de la somerkursaro en Ballarat.



Li malkovris kelkajn el niaj bestoj en sovaĝejo kaj iom de la centro de Melburno.




Sabaton vespere grupo de viktorianoj bonvenigis lin en la hejmo de Heather kaj lundon li ĉeestis la radioelsendon en 3ZZZ. Do vi povas aŭdi lin pere de la arkivoj je la adreso www.esperanto.com.au *Franciska Toubale*



Foto de miaj familianoj kiuj ĉeestis mian 93an naskiĝtagan feston
Kompreneble estas aliaj kiuj ne povas ĉeesti *Roger Springer*

# Esperanta Retradio

Donas bonan Ĉirkau -5 minutan aŭskultadon kaj legadon Ĉiun tagon

Ne estas facila elekti el la ĉiuj tagaj programoj

Do aŭskultu ĉiujn.

Kiel balbutado ekestas en la cerbo 08 de Junio 2024 (*Roger Springer*)

**3ZZZ** En la elsendo de la 10a de junio 2024 vi povas aŭdi intervjuon de la nuna vizitanto el Aŭstrujo, Ewald Schick , informojn pri la fama, blinda esperantistino Helen Keller kaj pri la "boatuloj de la 1970aj-1980aj", la vjenamanoj, kiuj fuĝis al Tajvano post la falo de Saigono *Franciska*



# LA POTENCO DE LINGVOJ

Esti dulingva, aŭ plurlingva, plibonigas la homan cerbon. Viorica Marian, naskiĝis en Moldovo kaj estas usona psikolingvisto. Ŝi raportas en nova libro, ke kiam dulingvulo uzas iun el siaj lingvoj, la alia estas aktiva paralele en sia cerbo samtempe. Rezulte la cerba regsistemo, kiu koncentras sur tio kio estas grava, konstante pliboniĝas. Same kiel fizika ekzercado ŝanĝas la korpon, tiel mensa aktivado rekonstruas la dulingvan cerbon.

Scienca esplorado montras, ke dulingvuloj havas avantaĝojn, eĉ je juna aĝo. Se en maljuneco ilin trafas demenco, la komenco de simptomoj okazas averaĝe kvin jarojn pli poste, kompare al unulingvanoj. La avantaĝoj ne estas ekskluzivaj al tiuj, kiuj lernis du lingvojn en infanaĝo, sed ankaŭ videblas en homoj kiuj lernis pluan lingvon en adolteco.

Ĉar lingvo kaj kulturo estas interligitaj, dulingvuloj povas havi malsamajn pensmanierojn por ĉiu lingvo. Ekzemple, kiam esploristoj demandis al homoj kiuj scipovas la mandarenan kaj la anglan diri la nomon de sukcesa virino kun fizikaj malkapabloj, ili pli ofte respondis menciante Helen Keller kiam ili parolas la anglan, kaj la ĉinan verkiston Zhang Haidi kiam ili parolas la mandarenan. Ili sciis ambaŭ respondojn, sed kio venis en la kapon, tio dependis de la lingvo uzata je tiu momento. Psikoterapiistoj devus konscii, ke la probableco ke dulingvulo memoros ion estas pli alta kiam oni uzas la saman lingvon kiel tio uzata kiam okazis la memorata evento.

La plejmulto de la homaro estas dulingva aŭ plurlingva. Tamen parolantoj de dominantaj lingvoj ŝajnas malpli fervoraj lerni pluan lingvon. Marian atentigas ironie, ke tio estas ĉar la avantaĝoj de plurlingvismo estas minimumigataj, miskomprenataj aŭ eĉ politikigataj.

Sed ni jam scias tion. *Donald Rogers*

adaptis el recenzo de Vijaysree Venkatraman en *New Scientist*, 15 April 2023, pri la verko *The Power of Language*, Viorica Marian, Pelican Books.

# La Manlia Esperanto-Klubo

La Manlia grupo kunvenas je 10.30 atm ĝis 12ptm la unuan kaj trian sabatojn de la monato Unu taso da klubpagita kafo atendos vin. Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Bluewater, Suda Stejno. La 15a de junio estos la tria sabato. VENU! *Roger Springer*